# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

http://www.sat-esperanto.org/ *** retadreso: satesperanto@free.fr




Foto: Marija Belošević

## ZAGREBO - 02.-09.07.2005



*Ombrelo el Ŝestine - parto de folkloraj vestoj el ĉirkaŭaĵo de Zagrebo fariĝis unu el la zagrebaj simboloj. Nia OKK elektis ĝin kiel simbolon de nia 78-a SAT-kongreso.*

*Supre - sur la foto - Ŝestina ombrelo produktata de familio Cerovečki.*
*Sube dekstre - glumarko kaj stilizita kongresa simbolo kreita de Nataŝa Prah.*

78a SAT-kongreso
ESPERANTO
2-9 de julio 2005
Zagreb, Kroatio

Novembro 2004 75-a jaro, n-ro 11 (1193)
MENSUEL / MONATA Prezo: 5 €
ISSN 1163.0442

**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI**

## El la redaktejo...



*Karaj,*
*kiel jam anoncite lastmonate, tiu ĉi numero estas komplete dediĉita al la protokolo pri la kongreslaboro en Bratislavo. Pro la fakto ke la teksto okupas ĉiujn paĝojn, ne eblis ilustri ĝin. Pro tio, sur tiu ĉi paĝo vi vidas malgrandan filmon pri la kongreso. Multe pli da fotoj kaj ilustraĵoj vi povas trovi en la reto ĉe la adreso: http://satesperanto.free.fr/kongresoj/kongreso2004/impresoj.html.*
*Venonta numero estos denove "normala" kun la kutimaj rubrikoj.*
*Denove mi invitas vin al frua aliĝo al nia kongreso, kiu certe estos ne nur fruktodona sed ankaŭ tre agrabla. Aliĝante frue vi pagas malpli kaj helpas al la O.K.K.*
***Referendumo : ne forgesu voĉdoni!***
*Via Redaktoro*

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesperanto@free.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39
BIC: PSSRFRPPPAR
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
¢efredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
❐
Imprimé par : EDRB, 7 rue Marie Pia, FR-91480 Quincy-sous-Senart.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques SCHRAM
Abonnement annuel/jara abono France 55 *.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

# Kongresa Filmo.....



*Salutas Petro Chrdle*



*Salutas Alica Komlöŝi*



*Marija Belošević legas la saluton de prezidanto de UEA*



*Nome de ILEI salutas Stefan McGill*



*Dum prelego - k-do Kep Enderby*




*Junulara folklora grupo*




*K-dino Tereza Kapista prelegas pri sia vojaĝo al Irano - vestita kiel iranaj virinoj.*



*Junaj Beogradanoj kantis por ni.*





*K-do Schram reklamas novan SAT-eldonaĵon - "Vivbruligita"*
*Ĉiuj fotoj: Rémy Bouchet*

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la CD en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon. La Redakcio

# PROTOKOLO

## DE LA KONGRESAJ LABORKUNSIDOJ - BRATISLAVO 2004

**Kongresejo**:
Kiel kongresejo servis la Hotelo Bratislava. Tiun ĉi fojon ni havis ŝancon, ke ĉio okazis surloke. Ni kongresis en la hotelo, manĝis kaj dormis. Tio estis tre praktika, krom por tiuj kiuj loĝis en Studenta hejmo, al kiu oni devis iri per tramo, ĉar la distanco estis sufiĉe granda.

**Libroservo** : sufiĉe grandan kaj riĉan libroservon de la Esperanto Societo de Bratislava (ESO), prizorgis Peter Baláž.

### SOLENA MALFERMO

Solena malfermo okazis dimanĉe matene je la 9h30 dum iom pli ol duonhoro. Fakte en la programo estis antaŭviditaj nur 30 minutoj sed tio estis eraro. Ja pluraj aferoj ne povis okazi ĉar mankis tempo, inter kiuj la salutado de landaj reprezentantoj kaj de individuoj. Pro tio estis decidite komenci la unuan laborkunsidon duonhoron pli frue por povi ebligi al diversaj kongresanoj saluti la kongreson.
Komence de la solena inaŭguro, bonvenigis la kongresanojn ĉeforganizanto de la kongreso, k-do **Petro Chrdle**. Tuj poste li transdonis la parolon al la prezidantino de ESO, **Alica Komlóši**. Ŝi diris:
*Saluton! Pasis jam denove unu laborplena jaro kaj denove jen kunvenis samideanaro. El la tuta mondo venis je ĉi rondo de la batalantoj por progreso al la SAT-kongreso.*
*Estimataj SAT-kongresanoj kaj karaj gesamideanoj. Nome de ESO mi elkore bonvenigas vin al Slovakio kaj al ĝia ĉefa urbo, Bratislava. Ĝi estas urbo relative malgranda sed kun riĉa pasinteco. Ĝi estas urbo kiu ricevis privilegion de la libera reĝa urbo jam en la jaro 1291 kaj kie en la jaro 1475 fondis la reĝo Mateo Korvin la faman universitaton Academia Histropolitana. Dum tri jarcentoj, en la jaro1563-1830 estis en la katedralo de Sankta Marteno kronitaj 19 hungariaj reĝoj kaj iliaj edzinoj. Sed pri tio vi pli detale ekscios de nia kolego Marteno Minich hodiaŭ antaŭtagmeze, kaj dum la urbotrarigardo hodiaŭ posttagmeze. Bratislava, el la vidpunkto de la loĝantaro, pro sia multlingveco similas Bjalistokon. Atestas tion ĝiaj historiaj nomoj: greke Histropolis, latine Posonium, hungare Pozsony (poĵonj), germane Pressburg. Tamen dum jarcentoj ĉi tie amike loĝis hungaroj, germanoj, slovakoj, ĉeĥoj, eĉ kroatoj. Post la Unua mondmilito, en la dudekaj jaroj, jam ekzistis en Bratislava sufiĉe forta Esperanta Societo : Esperanta Tablogirlando. Dum la kunvenoj ĝiaj anoj parolis nur esperante kaj denove pli detale vi ekscios pri tio tuj post la malfermo de d-rino Magda Šaturová, freŝa honora membro de UEA. Kaj je la fino, denove kelkaj versoj de la kongresa valso de nia poeto Eduard Vladimir Klarožek. Plej diverse ni ĉi tie nian tempon uzos. Iuj ŝvitos en kunvenoj aliaj sin amuzos. Kelkaj jam rapidis, ŝancon tuj profitis kaj jam trovis al si amikinon, eĉ kongresan edzinon. Karaj SAT-anoj - mi al vi ĉiuj deziras agrablan, sukcesplenan kongresadon."*
K-do **Petro Chrdle** aldonas kelkajn vortojn pri la rilatoj inter SAT kaj iama Ĉeĥoslovakio, kie SAT, kvankam maldekstra organizo, ne estis bone konsiderata kaj ne estis facile aliĝi al SAT. SAT estis tre danĝera organizaĵo, ĉar ĝi montris alian socialismon ol tiu de ĉeĥoslovakaj oficialaj instancoj. Li mem ne estis sufiĉe kuraĝa por tiatempe aliĝi al SAT sed aliĝis post la ŝanĝo de reĝimo. Tamen estis kelkaj esperantistoj kiuj malgraŭ grandaj riskoj estis membroj de SAT. Unu el tiuj estis nia tiama peranto por Ĉeĥoslovakio, **Miroslav Závodský**, honora ĉeestanto de la nuna kongreso, kiu perantis por SAT malgraŭ ĉiuj danĝeroj. Publikan dankon al li. (*aplaŭdo*).
Sekvis la saluto de la prezidanto de la P.K., k-do **Jakvo Schram**. Li diris (resumo):
*Karaj gekamaradoj, karaj gastoj, estu bonvenaj al nia 77-a SAT-kongreso en la urbo Bratislava.*
*Se mi nun komencus laŭdi la belecon kaj gravecon de tiu ĉi urbo, vi prave povus riproĉi al mi ke mi ne estas sincera. Mi vizitas ĉi tiun landon kaj la urbon la unuan fojon en mia vivo. Mi ĉi tie faris nur kelkajn unuajn paŝojn. Tial mi ne povas serioze pritaksi aŭ laŭdi. Tamen mi kuraĝas diri, surbaze de la kontaktoj kun la lokaj organizantoj, ke la kongreso okazos en la bona loko.*
*En miaj enkondukaj salutvortoj mi volas tuŝi problemojn de nia movado. Kiam antaŭ 83 jaroj k-do Lanti fondis SAT, estis klare deklarita la fakto, ke ĉi tiu organizo nepre ne estas neŭtrala, eĉ male - ĝi devas esti engaĝita. K-do Lanti celis krei asocion kiu defendas socialismon. Mi imfazas, - humanisman socialismon -laŭ la plej larĝa bazo imagebla. Se mi bone komprenas lian verkon, li intencis ne nur forigi neŭtralismon, sed ankaŭ ajnan fanatikecon. La devizo "for la fanatikecon" signifas, laŭ mia kompreno, ke ni ĉiuj rajtas havi niajn filozofian, etikan kaj politikan konvinkojn, sed ke ni devas respekti aliajn opiniojn kaj konvinkojn, kiuj defendas laŭ aliaj manieroj socialismon. Tamen, "neneutraleco" signifas, ke ni ne rajtas toleri sistemojn kaj movadojn, kiuj emas subpremi, sklavigi hopojn pro ilia socia deveno, nacio, haŭtkoloro, religio ktp.*
*Bedaŭrinde la nuna socio ne tro favoras tian engaĝitecon, kiun celas nia organizo. Por multaj homoj estas "solidareco" iom fremda vorto kaj ili emas kaŝi sin malantaŭ la falsa neŭtraleco. Ni sciu ke estas landoj, ankaŭ Slovakio, en kiu ni nun kunvenas, kie al multegaj homoj la haroj hirtiĝas, kiam ili aŭdas la vortojn "socialismo", "klasbatalo", "kamarado" ktp. Ni ne miru. En ĉi tiuj landoj vicon da jaroj diversaj diktatoroj, aŭtokratoj, misuzis tiujn vortojn por siaj malnoblaj celoj. Estas ankaŭ la tasko de nia asocio redoni al tiuj vortoj ilian ĝustan signifon, puran, nekripligitan enhavon. Mi esperas, ke ĉi tiu kongreso, kaj vico da diskutoj dum ĝi, estos unu el la paŝoj al tiu nia celo.*
*SAT elektis Esperanton kiel laborlingvon. Ni komprenu, ke tio ne estis pro iom naiva kredo de la unuaj esperantistoj, ke la neŭtrala lingvo solvos ĉiujn problemojn de la nuntempa mondo. Tiu elekto estis pro la emfazo de la sennacieco de la asocio. Ni ĉiam devas scii, ke nur lingvo solvos nenion. Por solvi la problemon de militoj, malsato, ekspluatado de homoj, kapitalismaj maljustaĵoj, ni bezonas pli ol nur Esperanton, ni bezonas pli ol nur vortojn kaj frazojn. Ni bezonas engaĝiĝon. Ni devas agadi por la monda solidareco inter ĉiuj homoj. Ni devos konvinki precipe junularon, ke niaj ideoj ne estas eksmoda brokantaĵo inda nur por grandaĝuloj.*
*Mi deziras al vi ĉiuj tre fruktodonan kongreson. Mi estas certa, ke ne estas via celo nur ferii en Slovakio, sed precipe konkonstrui la novan SAT, kiu estos kupolo de ĉiuj maldekstraj*